



IMPRESSO

PERMESITA LA INSTRUADO DE ESPERANTO ĈE FEDERACIA UNIVERSITATO DE PARANA

Laŭ informo aperinta en "Paraná Informilo" (Oficiala Bulteno de Paraná Esperanto-Asocio), nº 03, dec/84-jan/85, kiun ni represas ĉi-sube, ekde la lernojaro 1985, estas permesita la instruado de esperanto al la studentoj de Federacia Universitato de Paraná (sudbrazila ŝtato):

ESPERANTO EN UNIVERSITATO

La informo estas oficiala: Esperanto estos, ekde la proksima jaro, nedeviga lernoobjekto de la Federacia Universitato de Paraná. La akcepto de Esperanto en la kadro de la lernoobjektoj de la universitato estas rezulto de propono farita de profesoro Geraldo Mattos kaj aprobita de la Departemento pri Lingvistiko.

Esperanto havas la universitatan kodon HL 432. La tagoj por la instruo de Esperanto jam estas difinitaj: lundon, de la 15-a kaj duono, ĝis la 18-a kaj duono kaj mardon, de la 16-a kaj duono ĝis la 18-a kaj duono.

La lernoobjekto Esperanto estos destinita, unue, al la gelernantoj de Beletro, sed ĉiuj gelernantoj de la universitato rajtas aliĝi.

Paraná Esperanto-Asocio varme gratulas profesoron Geraldo Mattos kaj esperas, ke la iniciato estu fruktodona kaj signu markon en la historio de Esperanto, ne nur en Paraná, sed ankaŭ en la tuta Brazilo.

Curitiba, decembro/1984/januaro/1985/03 NFORMILO

KULITURKUNVENOJ EN LA SIDEJO DE BEL - PROGRAMO POR MARTO/85

02/03 - Prelego de S-ano Jair Salles pri la temo "ENKONDUKO AL LA INTERLINGVISTIKO"

09/03 - KONVERSACIA RONDO (Skecoj, kantoj, vortludoj, deklamado, "viva recenzo" ktp ...)

16/03 - FORUMO: Debato pri la temo "ĈU PARLAMENTA AŬ PREZIDENTA REĜIMO" (Aloisio Sartorato x Luiz Alberto Martins)

23/03 - KONVERSACIA RONDO

30/03 - Prelego de S-anino May Bijleveld pri la temo "RADIESTEZO"

* Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la 16a. horo *

NEK KUNVENAS EN RIO

En januaro, NEK (Nacia Esperanto-Komisiono) okazigis du kunvenojn en Rio de Janeiro: unu ĉe la sidejo de KKE kaj alia ĉe la sidejo de BEL. Partoprenis la prezidantoj de la tri landaj esperanto-organizaĵoj (BEL, BKE kaj KKE) kaj oni pritraktis, interalie, detalojn pri la okazonta XXI Brazila E-o Kongreso, en Belo Horizonte.

BEL PROGRESIS EN 1984

La ciferoj estas definitivaj!

Jen ĉi-sube la stato de la membraro de BEL je la 31/12/84. Interparenteze, troviĝas la ciferoj rilataj al 1983.

Post komparo inter la ciferoj de tiuj du jaroj, kion ni konstatas?

Ni konstatas, unue, pozitivan rezultaton ĉar la membraro de BEL kreskis, en 1984, je 6%, pro tio ke, en 1983, ni havis entute 478 membrojn kaj, nun, en 1984, ni havas 509 membrojn (kresko je 31 membroj).

Due, ke la plej grandaj procentaj kreskoj okazis en:

Salari Maria Maria	1983	1984	(%)
- Paraiba	1	5	+ 400%
- Espírito Santo	1	4	+ 300%
- Parana	28	57	+ 107%

Laŭkvante, la plej granda kresko okazis en Paraná, kie, en 83, ni havis 28 membrojn kaj nun ni havas 57. Do, kresko je 29 membroj. Sekvis São Paulo (+) 28 kaj Bahia (+) 6. Gratulojn!

Tamen, kun bedaŭro, ni registras perdojn en la Norda (-1) kaj Sudorienta (-9) Regionoj.Laŭ ŝtate, la plej granda perdo okazis en Rio de Janeiro (-38).

Kaj, el 1985, kion ni atendas? Ni atendas kaj ankaŭ esperas ke ...

... la ciferoj rilataj al la Norda Regiono fariĝu pli proksimaj al la reala kvanto da esperan tistoj kiuj ekzistas tie (laŭ Amazonia E-ista Adresaro, 123 samideanoj en 43 urboj!);

... Rio de Janeiro, kie troviĝas 44% de la tuta membraro de BEL, sukcesu revarbi, denove, la perdintajn 38 membrojn;

... en la sudo, Rio Grande do Sul kaj Santa Catarina sekvu la ekzemplon de Paraná kaj aligu al BEL tiom da esperantistoj kiom faris tiu lasta ŝtato.

Laste, ni petas al ĉiuj mediti pri la jeno: Forta BEL signifas fortan UEA-n kaj fortan esperanto-movadon. Do, ek al varbado!

ŜTATO	M-S	<u>M-1</u>	<u>M-2</u>	ENTUTE	D-M	B-M	ENTUTE
AC	- (01)	- ()	- (-)	- (01)			
AM	- (-)	01 (03)	- (-)	- (01)	- (-)	- (-)	- (01)
PA	02 (02)	- (-)	01 (-)	01 (03) 03 (02)	- (-)	- (-)	01 (03)
AP	- (-)	- (-)	- (-)	03 (02)	- (-)	- (-)	0.3 (02)
RO	01 (-)	- (-)	- (-)	- (-)	- (-)	- (-)	- (-)
RR	- (-)	- (-)	- (-)	01 (-)	- (-)	- (-)	01 (-)
Nordo	03 (03)	01 (03)	01 (-)	- (-)	_ (_)	- (-)	- (-)
MA	01 (02)	- (01)	- (-)	05 (06)	- (-)	- (-)	05 (06)
PI	- (-)	01 (01)	- (-)	01 (03)	- (-)	- (-)	01 (03)
CE	03 (02)	02 (03)	01 ()	01 (01)	- (-)	- (-)	01 (01)
RN	01 (-)	- (-)	07 ()	06 (05)	01 (01)	- (-)	07 (06)
PB	04 (01)	01 (-)	()	02 (-)	- (-)	(<u>-</u>)	02 (-)
PE	05 (03)	03 (04)	, ,	05 (01)	- ()	- (-)	05 (01)
AL	- (01)	02 (02)	()	08 (07)	01 (01)	– (· –)	09 (08)
SE	01 ()	- (-)	- (01) - (-)	02 (04)	- (-)	- (-)	02 (04)
BA	05 (02)	07 (04)	02 (02)	01 (-)	- (-)	- (-)	01 (-)
Nordorie.	20 (11)	16 (15)	02 (02)	14 (08)	01 (01)	- (-)	15 (09)
ES	02 (-)	01 (01)		40 (29)	03 (03)	- (-)	43. (32)
MG	29 (28)	18 (20)	01 ((-)	04 (01)	- (-)	- (-)	04 (01)
RJ	126 (169)		01 (02)	48 (50)	02 (02)	- (-)	50 (52)
SP	47 (35)		13 (12)	199 (240)	21 (18)	03 (02)	222 (260)
Sudorie.	204 (232)		03 (05)	82 (56)	05 (04)	01 (-)	88 (60)
PR	50 (19)	111 (96)	18 (19)	333 (347)	28 (24)	04 (02)	364 (373)
SC	05 (05)	05 (06) 02 (03)	- (01)	55 (26)	02 (02)	- (-)	57 (28)
RS	08 (11)		- (-)	07 (08)	- (-)	- (-)	07 (08)
Sudo	63 (35)	08 (06) 15 (15)	- (-)	16 (17)	- (-)	- (-)	16 (17)
DF	07 (04)	02 (04)	- (01)	78 (51)	02 (02)	- (-)	80 (53)
GO	01 (02)		- (-)	09 (08)	01 (0 1)	- (-)	10 (09)
MT	01 (01)	, , ,	- (-)	03 (03)	- (-)	- (-)	03 (03)
MS	01 (01)	- (-)	- (-)	01 (01)	- (-)	- (-)	01 (01)
Centrokc.	10 (07)	- (01) 04 (06)	01 (-)	02 (01)	- (-)	- (-)	02 (01)
BRAZILO	300 (288)		01 (-)	15 (13)	01 (01)	- (-)	16 (14)
	300 (200)	147 (135)	24 (23)	471 (446)	34 (30)	04 (02)	509 (478)

Mallongigoj: M-S: Membro-simpatianto

M-1: Membro 1 M-2: Membro 2

D-M: Dumviva Membro

B-M: Confarinta-Membro

"TV-MANCHETE", DENOVE, PRI ESPERANTO

La 28-an de januaro, "TV-Manchete" elsendis, denove, informon pri esperanto. Ĉi-foje, temis pri la programo 'Manchete Shopping Show", dissendata, ĉiutage, de la 14h30m ĝis la 16h30m. S-ro Jonas Rezende (simpatianto de esperanto), kiu, ĉiuprograme, prezentas variajn aktualajn temojn, pritraktis la internacian lingvon. Estis kvin-minutaj informoj pri la lingvo, Zamenhof kaj la mo vado, kun speciala mencio al la Jarcenta Jubileo de Esperanto. La plej grava: ĉiuj informoj estis kompilitaj el nia portugallingva bulteno "ESPERANTO noticias", kiun ni sendas, ĉiumonate, ne nur al tiu ĵurnalisto, sed ankaŭ al centoj da gazetoj tra la tuta lando.

MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

"BRAZILA ANTOLOGIO POEZIA" APERONTA - Jen informo publikigita en "Komunikoj de Spirita Eldona Societo F.V.Lorenz", nº 36, 15/12/84: "baldaŭ aperos Brazila Antologio Poezia, de F.V.Lorenz, eldono de Societo Lorenz. Ĝi estis metita en la programo por la Centjara Jubileo, kaj enhavas poeziojn de Euzebio de Matos (17a.j) ĝis Cecilia Meireles kaj Carlos Drummond de Andrade (nuntempaj), majstre tradukitaj".

AMAZONIA ESPERANTISTA ADRESARO 2/84: 123 ADRESOJ EN 41 URBOJ - Ĵus aperis la dua eldono, rilate al 1984, de Amazonia Esperantista Adresaro, kiu entenas 123 adresojn en 41 urboj. La kunordiganto de tiu publikigaĵo estas S-ano Ramiro B. de Castro (Rua Diogo Moia, 1156 - 66.000 BEIEM, Pará).

"NOBEL-PREMION POR JEZUO" - Tiu estas la temo de kolorilustrita prospekto en esperanto, eldonita de "Legião da Boa Vontade" (brazila filantropia institucio), Av. Rudge, 938 - Bom Retiro, 01134 - SÃO PAULO, SP.

LA MOVADO ANKAŬ FLORAS EN CUIABÁ - "Niaj bazaj Esperanto-kursoj, en Cuiabá, komenciĝis en la 21-a de septembro kaj finigis en la 15-a de decembro, ĉe Federacia Universitato de Mato Grosso, Liceu Cuiabano kaj Sekretariejo pri Kulturo. Proksiman semajnon, ĉirkaŭ 20 novaj esperantistoj ricevos diplomon". Tiel informis nin S-ano Amarílio Carvalho.


ORGANIZITA ESPERANTO-GRUPO ĈE SPIRITISMA CENTRO "NOVA ERA", EN BELÉM, SÃO PAULO - S-ano José Machado, Direktoro de tiu Grupo, skribis al ni informante pri ĝia starigo kaj ankaŭ sciigante nin ke, la 2-an de februaro 85, 22 gelernantoj ricevos siajn diplomojn pri baza kono de esperanto (Rua Martin Afonso, 78 - Casa 6, Belém, São Paulo).

ESPERANTISTOJ EL BAHIA KUNFRATIĜAS EN SALVADOR - Tio okazis, la 2-an de decembro, pasintjare, en "Parko de la Urbo", en Salvador, kie 21 gesamideanoj, apartenantaj al "Esperanta StudGrupo Zamenhof", "Bahia Esperanto-Asocio" kaj "Esperantista Societo de Salvador", gaje kaj amike, havis kunfratiĝan kunvenon konsistantan el prelegetoj, vortludoj, kantadoj, ktp ... (raportis Aldacy de Souza Xavier).

26 ESPERANTO-GRUPOJ EN ŜTATO SÃO PAULO - Laŭ intormo aperinta en "La Lampiro" (oficiala organo de "Esperanto-Asocio de San-Paŭlo"), nº 37, okt/nov/dec/84, funkcias en tiu ŝtato, nuntempe, 26 esperanto-grupoj.

ESPERANTO ĈE "BANCO DO BRASIL"

Daŭras la agado de la duopo Jorge das Neves kaj Ruy Albuquerque favore al esperanto, ĉe Banco do Brasil. Nun, ili lanĉis esperantlingvan bultenon nomatan PIB (Pionira Inform-Bulteno), kies prezentam artikolomni represas ĉi-sube. Interalie, tiu unua bulteno publikigas interesan liston kun nomoj de ĉirkaŭ 150 esperantistoj, kiuj estas oficistoj de "Banco do Brasil".



PREZENTO

Karaj gesamideanoj kaj gekolegoj,

Forte kreskas la esperanto-movado en nia tre
amata Brazilo. Rimarkinda estas ke ankaŭ en nia
banka medio multobliĝas la nombro da personoj kiuj

interesiĝas pri la internacia lingvo Esperanto.Plie ekzistas multaj kiuj jam estas veteranoj kaj ĉi am okupiĝas dissemante la fratecan lingvon.

Pro tio estas necese doni al nia esperantista kolegaro esprimilon por diskonigi ties ideojn kaj kontribuojn kiuj povas sendube enriĉigi la reciprokajn kulturrilatojn en nia medio.

La kunlaborado de ĉiuj samideanoj estas ĉiam bonvena kaj oni povas senerare certiĝi ke sen ĉies helpo ni ne atingos la vojon celitan kaj la entrepreno tute fiaskos.

Tre diversaj estas la temoj pritrakteblaj en nia bulteno (ludaj, historiaj, sciencaj, teknikaj, e-konomikaj, literaturaj ktp) kaj por plene sukcesi oni devas agi sur kampo ĉiuaspekte neŭtrala por ne ĝeni individuajn aŭ kolektivajn sentojn pri religio aŭ politiko. Finfine, estas nia celo plenumi servojn al la esperantistaro, al la nacio kaj al la tu ta homaro.

NOVAĴOJ PRI BEL

VIZITOJ, EN JANUARO, AL BEL - Dum la pasinta monato, vizitis nin la jenaj samideanoj:

02/01 - S-ano Luiz Carlos Nunes D'Angelo, el Curitiba (PR)

09/01 - S-ano Isao Noguti, el Salvador (BH)

17/01 - S-ano Sirio Silva, el Rezende (RJ)

29/01 - S-ano Paulo Sérgio Viana, el Lorena (SP)

DONACOJ AL BEL, EN JANUARO:

- S-ano Jorge Monteiro Oliveira da Silva (Niterói, RJ): Cr\$ 37.000
- S-ano Jacy G. de Miranda Sá (Rio de Janeiro, RJ): Cr\$ 2.720

- S-ano Ely Figueira (Rio de Janeiro, RJ): Cr\$ 2.000

- S-ano Cleber de Moraes Lemos (Salvador, BH): Cr\$ 30.080
- S-ano Jair Salles (Rio de Janeiro, RJ): Cr\$ 3.063

Al ĉiuj, koran dankon!

LIVERITAJ DIPLOMOJ, EN JANUARO:

- Baza Kurso: 08
- Progresiga Kurso: 06

ELDONITAJ DOKUMENTOJ, EN JANUARO:

- Enspeznotoj: 140
- Rembursa enspeznotoj: 01
- Leteroj: 26

LIBROSERVO DE BEL LIBROSERVO D

La prezoj de la eksterlandaj eldonaĵoj, <u>de nun</u>, aperas en ORIN (brazila valorunuo).

- ALMANAKO LORENZ/1985, Eld. Spirita Societo F.V.Lorenz, Rio de Janeiro, 1985, 143p. Diversaj artikoloj kiuj interesas la modernan homon laŭ la spirita vidpunkto. Cr\$ 5.000.
- LA BUFO, de Sylla Chaves. Eld. Sono-Viso, Rio de Janeiro, 1984, Disko duflanka kun kvar muzikoj: La Bufo, Pli Bona Mondo, Kolor-malsamo ne gravas kaj La Magia Flutisto. Kantas Joel de Castro kaj Franca Fenati. Cr\$ 4.500.
- VOCABULÁRIO PORTUGUÊS-ESPERANTO-PORTUGUÊS, de Carlos Dominges, Eld. Brazila E-Ligo, Rio de Janeiro, 4a. eld., 1984, 233p. Dudirekta vortaro. Cr\$ 8.000
- THE DEVELOPMENT OF POETIC LANGUAGUE IN ESPERANTO, de William Auld. Esperanto Documents no 4, Eld. UEA, Rotterdam, 1976, 11p. Prezo: 0,15 ORTN.
- INTERNATIONAL TRAVEL BY SPEAKERS OF ESPERANTO, de Tyburcjusz Tyblewski. Esperanto Documents no 9, Eld. UEA, Rotterdam, 1977, 8p. Prezo: 0,15 ORTN.
- THE FUTURE OF MODERN LANGUAGES IN ENGLISH-SPEAKING COUNTRIE, de Humphrey Tonkin kaj Grahame Leon-Smith, Esperanto Documents no 18, Eld. UEA, Rotterdam, 1979, 20p. Prezo: 0,15 ORTN.
- THE CULTURAL VALUE OF ESPERANTO, de D.B. Gregor. Esperanto Documents no 197. Eld. UEA, Rotter-dam, 1979, 12p. 0,15 ORTN
- ESPERANTO: EUROPEAN OR ASIATIC LANGUAGE? de Claude Piron, Esperanto Documents nº 22-A, Eld. UEA, Rotterdam, 1981, 31p. 0,15 ORTN
- ESPERANTO: ĈU EŬROPA AŬ AZIA LINGVO? de Claude Piron, Esperanto Documents 10E, Eld. UEA, Rotter-dam, 1981, 32p., 0,15 ORTN.
- LINGVO KAJ MOVADO, de W.F. Kruit, Eld. Bond Van Arbeiders-Esperantisten F.L.E., Uitgave, 2a. eld. 16p. Konciza gvidilo pri la Esperanto-movado kaj lingvo. 0,8 ORTN
- HUMURAĴOJ DE MALNOVA JAPANIO, Div. tradukantoj, Eld. SER, Tokio, 2a. eld., 1982, 51p. 0,49 ORTN.
- 50 FABLOJ DE EZOPO, de Nakagaki-K, Eld. Japana Esperanto Librokooperativo, 36p. 0,10 ORTN.
- ESPERANTO FOR BEGINNERS, de Montagu C. Butler, Eld. The Britisk E-Asociation, London, 24p. 0,08 ORTN.

BEL informas/februaro/85. Eldonkvanto: 1.500